# INTER NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth, Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 260 Decembro, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — Kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto


Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5


Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## SEZONAJ BONDEZIROJ

Pro diversaj religiaj kaj jarfinaj festoj, Decembro estas kutima sezono por bondeziri al la gefamilianoj, la gekonatuloj kaj la gesamideanoj tra la mondo. En Esperantio, la 15-a de decembro ankaŭ estas grava tago por festi la naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof kaj la Tagon de la libro. La redakcio de ***Inter Ni*** deziras ĉion bonan al la legantoj de nia gazeteto dum ĉi tiuj festaj tagoj kaj tra la venonta jaro.

„Jam temp' esta" por (re)aboni al ***Inter Ni***.

Kion vi opinias pri la enhavo de ĉi tiu gazeteto? Ĉu plaĉas al vi la oportuno por praktiki la verkadon de tekstoj, kiujn vi povas partigi kun la aliaj esperantistoj inter ni? Ĉu vi havas plendojn pri la gazeteto aŭ pri ties enhavo? Mi petas, ke vi sendu ilin al mi. Mi ankaŭ petas, ke vi bonvolas ne forgesi sendi vian abonkotizon al nia kasisto por ke vi povu daŭre restu inter ni.

Jarfinajn bondezirojn sendas al vi la redaktoro

— Bob Williamson

# KRIZO PRI RADIOAKTIVAJ ĤEMIAĴOJ EN KANADO

Nuntempe en Kanado (kaj ankaŭ en aliaj landoj) estas manko de radio-izotopoj por medicinaj testoj. Tio estas pro la abrupta ĉesigo de la atoma pilo (reaktoro) ĉe Kret-Rivero (Chalk River) en Ontario. Inspektisto trovis, ke estas danĝero pro problemoj kiuj urĝe postulas riparon. La ĉefo de la atom-reaktoro tuj malfunkci-igis la reaktoron dirante, ke li absolute ne povas riski nuklean akcidenton. Pro la senaverta ĉesigo, mankis tempo por plani novan fonton de la radioaktivaj ĥemiaĵoj por la kanadaj hospitaloj. Efektive, la reaktoro ĉe Kret-Rivero fakte produktas du trionojn el la radioizotopoj uzataj por medicinaj celoj en la tuta mondo! Estas en Kanado du aliaj reaktoroj , kiujn oni ĵus konstruis por produkti radioaktivajn izotopojn, sed estis problemoj kaj ili ne estas pretaj por funkcii. (Reaktoroj por radioaktivigi ĥemiaĵojn iom malsimilas de reaktoroj por produkti energion.)

La farmaciaj firmaoj pretigas la diversajn ĥemiaĵojn kaj luas spacon en la granda ĉambro ĉirkaŭ la reaktoro. Oni funkciigas la reaktoron kaj „bombas” la ĥemiaĵojn per neŭtronoj de la nukleofendado de uranio. Matematikistoj povas bone antaŭkalkuli la finan radioaktivecon de la ĥemiaĵoj de la forto kaj daŭro de la bombado kaj de la distanco kaj geometrio inter la pilo kaj la ĥemiaĵoj.

La plej utila el la ĥemiaĵoj por medicinaj testoj estas teknecio (pli precize, teknecio-99m aŭ $^{99m}$T). Kuracistoj uzas ĝin por diagnozi multajn aferojn, inter kiuj estas kanceroj de la pulmoj, mamoj, cerbo kaj tiroido, trombozo en la vejnoj, malsanoj en limfonodoj, funkcio en la ostoj, kaj, eĉ pli urĝe, sangofluo en la koro post trombozo en koronaria arterio. Radioaktiva teknecio estas ideala radioĥemiaĵo, pro tio ke ĝi radias nur $\gamma$-radiojn en tre oportuna parto de la elektromagneta gamo, kaj ne disdonas danĝerajn $\beta$-partiklojn. Plue, la duon-vivo de la teknecio estas nur 6 horoj, kaj pro tio preskaŭ tute malaperas post nur 60 horoj. Estas interese, tamen, ke oni ne produktas la teknecion en la atom-reaktoro (estus nepraktike pro la mallonga duonvivo). Anstataŭe oni produktas radioaktivan molibdenon (pli precize, oni parolas pri molibdeno-99 aŭ $^{99}$Mo), kiu havas duonvivon de 66 horoj. Oni nomas ĝin „la molibdena bovino”. En ĉiu hospitala radiolaboratorio la teknikisto ĉiutage „melkas” la molibdenan bovinon, por akiri la radioaktivan teknecion, kiu estas kadukiĝa produkto de la radioaktiva molibdeno.

Laŭ la instancoj, oni bezonos almenaŭ tempon ĝis la mezo de januaro por ĝustigi la problemojn ĉe la atom-reaktoro en Kret-Rivero. Do, oni esperas, ke iom post tiu dato la kuracistoj refoje povos utiligi radioaktivajn izotopojn en la ĉiutaga diagnozo kaj taksado de la pacientoj, kaj la teknikistoj refoje povos ĉiutage melki la molibdenan bovinon.

— Steĉjo

# La Koloro Oranĝa

Ricevita retmesaĝe

Al la monda esperantistaro,

Mi skribas al vi por alvoki vin subteni la kampanjon „La Koloro Oranĝa" por kiu mi estas internacia sekretario, vidu ĉe-metitan tekston. La celo estas atentigi pri la subpremo de la homaj rajtoj en Ĉinio okaze de la Olimpiaj Ludoj en aŭgusto 2008. Ni volas enkonduki la Koloron Oranĝan kiel simbolon de kritiko de la ĉina registaro. Ni alvokas al ĉiuj kiuj eniros la olimpian stadion vaste uzi la koloron, ekzemple por la vestaĵo kaj diversaj objektoj kiel globkrajonoj, papero, naztukoj ktp. La totalisma reĝimo ne povos malpermesi la Koloron Oranĝan, sed estos tute sendefenda al tia kampanjo.

Mi imagas ke la proksima Zamenhofa Festo povus esti taŭga okazo por prezenti la kampanjon kaj diskuti kiel subteni ĝin. La manieroj kontribui estas senfinaj. Ekzemple, ni bezonas tradukon de la ĉe-metita alvoko en multege da lingvoj por la lanĉo de la kampanjo kiun ni planas por la komenco de la nova jaro. Ni tre volonte ricevos VIAJN ideojn pri agado.

Ni laboradas pri la retpaĝo de la projekto. Ĝi ankoraŭ estas rudimenta, sed baldaŭ iĝos pli bona, rilate kaj al formo kaj enhavo. La adreso estas:
http://www.thecolororange.net

Mi esperas aŭdi de vi cele al fruktodona kunlaboro.

Kore salutas
S-ro Vagn Frausing

Banevaenget 22, DK-5270 Odense N, Danio
Tel.: +45 6618 4058, Fakso: +45 6618 4158
Retpoŝto: contact@TheColorOrange.net
Retpaĝo: http://www.TheColorOrange.net

La ĉe-metitan esperantan tekston vi trovos en:
http://www.thecolororange.net/uk/page21_eo

Kion opinias la legantoj pri tiu kampanjo? Ni invitas viajn reagojn.

— la redakcio


## JAM RICEVITAJ BONDEZIROJ

Karaj geamikoj,

Saluton el Carleton Place, Ontario. Mi esperas, ke vi kaj viaj familioj fartas bone. Mi kredas, ke Halifax, Dartmouth ktp havas tiom da neĝo kiom ni havas...

Mi deziras pacon, sanon, kaj feliĉon al vi kaj viaj familioj dum la venonta jaro. Ĝis!

Jennifer Geren



Feliĉan, Sanktan Kristnaskon 2007-an
Kaj Sanan 2008-an plenita da Ĝojon
Kore, Ed Harler

P.S. Dankon al ĉiuj el vi pro via bona laboro je ***Inter Ni***.



Dum kristnaska antaŭvespero, 9-jaraĝa infano pretigis lakton kaj kuketojn por Avo Frosto. Li petis permeson ankaŭ provizi botelon da biero – eventuale ke Avo Frosto soifus, kaj la patro konsentis, ridante pri tiu ideo. La sekvantan matenon, la junulo ekscitita petis la gepatrojn veni kaj vidi, ke Avo Frosto trinkis duon-botelon da biero. „Jen! Ja ekzistas Avo Frosto, ĉar paĉjo ja fortrinkus la tutan botelon!"

— Karen Bellamy, ***Reader's Digest***

☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺